

Eŭropa Bulteno

Septembro 2015, Numero 152

KRYNICA: JUBILEA PARTOPRENO EN LA JUBILEA EKONOMIA FORUMO

Iĝis jam bona tradicio, partopreni kiel “Esperanto” en la prestiĝa “Ekonomia Forumo” en la pola urbo Krynica-Zdrój. Du jubileoj okazis tie ĉi-jare: la forumo mem festis sian 25an jaron, kaj samtempe Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) kun la Esperanto-stando partoprenis ĝin jam la



dekan fojon.

La forumo, ofte nomata “pola Davos”, altiris ĉi-jare rekorde multajn: tri mil partoprenantoj el 60 landoj aliĝis al tiu ĉi grava evento, kiu okazis la 8-10an de septembro 2015. La ekonomia forumo estas aranĝo kun pintaj personoj de la politika, ekonomia, sed ankaŭ de la socia kaj kultura vivo. Tiajn homojn eblas ĉiujare renkonti dum la forumo, kaj ili kreas plejparton de la programo. Ĉi-foje prezidentoj de Pollando, Kroatio kaj Makedonio malfermis la forumon, diskutante pri la plej aktualaj temoj.

Ĉi-jara ĉeftemo de la forumo estis “Kiel konstrui fortan Eŭropon? Strategio por estonto”. Bedaŭrinde, oni denove (aŭ daŭre) ne komprenas, ke por fortigi senton de la komuneco oni bezonas komunan lingvon. Do pri Esperanto (entute pri lingva temaro en pli vasta kunteksto) oni daŭre evitas paroli.

La programo de la evento estis plenega, ŝajne parte pro la jubilea jaro, parte pro la akriĝantaj problemoj kaj en la mondo kaj en la Eŭropa Unio (EU). Multaj diskutoj do temis ĝuste pri la nuna situacio rilate al la rifuĝintoj, defendado kaj armeaj konfliktoj, eŭro-krizo kaj simile. Pri Esperanto (kaj rilataj temoj) ne okazis propra diskutpanelo de EEU ĉi-jare, sed ne pro iu neŝato pri la temo, sed simple pro la troa programo dum la jubilea forumo. Estis pluraj programeroj, kiujn la organizantoj devis rifuzi ĝuste pro tro multaj prelegoj kaj diskutoj. Ja kompare kun antaŭaj jaroj la unuajn du tagojn la prelegoj okazis eĉ ĝis la 22a horo! Paralele okazis eĉ 18 prelegoj kaj diskutoj, kio ankaŭ estas rekordo ĝisnuna.



Esperanto tamen bone videblis en la aranĝo – jam la dekan fojon funkciis la Esperanto-stando, kun buntaj informiloj pri Esperanto en la tri laborlingvoj de la forumo (la pola, rusa kaj angla). Pluraj centoj da ili estis disdonitaj al preterpasantoj. La plej popularaj estis skribiloj, insignoj, fald- kaj flugfolioj. Al pli seriozaj interesiĝantoj (kiuj pasigis ioman tempon ĉe la stando kaj vigle interesiĝis pri la lingvo oni donis ankaŭ la DVDjn pri Esperanto (produktitajn de E@I): *Esperanto elektronike*, *Esperanto estas...* kaj *Esperanto*. Disdonata estis ankaŭ kvizo pri Esperanto kun baza enkonduko al la lingvo kaj ekzercoj.

Pri Esperanto tamen oni parolis dum kelkaj diskutoj – kio eĉ pli gravas kaj interesas, ke la temojn malfermis ne ĉeestantaj esperantistoj, sed “ordinara publiko”. Dum diskutoj pri la estonta aspekto de EU (“Kian Eŭropon ni volas en la estonteco?”), pri politika integriĝo aŭ entute pri estonto de EU oni levis la demandon, rimarkon pri la bezono de interkompreniĝo kaj ebla rolo de Esperanto por tio. Kompreneble la vojo por akcepti ion tian de plimulto estas ankoraŭ longa, sed eble paradokse, la nunaj akriĝantaj problemoj povus eĉ parte helpi – ĝuste dum krizaj momentoj oni ja serĉas efikajn kaj rapidajn solvojn – kaj Esperanto ja estas tia.

Videblo de Esperanto do en tiu ĉi loko estas tre grava de pluraj kialoj. Se oni emos konsideri pli serioze la rolon de Esperanto en la estonteco (ĉu tutmonde, ĉu en EU), oni devas esti pli kaj pli ofte vidataj. Gravas ankaŭ partopreni tiajn ĉi aranĝojn, kie ĝuste la decidfarantoj partoprenas – kiuj povas influi aŭ eĉ iniciati decidojn, favorajn (aŭ ne) por antaŭenigo de Esperanto, komuna estonteco, paca kunvivado ktp. La loko ankaŭ donas eblon diskuti kun tre malsamaj personoj, partoprenantaj la forumon kaj vidi/aŭdi iliajn opiniojn, povi reagi al ili kaj samtempe videbligi la komunikan temon de eŭropa integriĝo.

Krom en la stando Esperanto videblis ankaŭ per bela kultura programero – koncerto de *Junaj voĉoj* okazis en la lasta tago de la forumo posttagmeze. Pri ĝi aperis tutpaĝa informo en la programa libro, kiun ĉiu partoprenanto ricevis. La ensemblo de proksima urbo Nowy Sącz prezentiĝis ĉi-jare ankaŭ en la 100a UK en Lillo. Ĝi estas junulara grupo, kantanta diversspecajn kantojn (inkluzive de popolaj sed ankaŭ popularaj kaj romantikaj) en Esperanto.



Grandan dankon meritis speciale la nelacigebla pola aktivulino Halina Komar, danke al kiu entute la partopreno de Esperanto en tiu ĉi forumo estas ebla. Dankon meritas ankaŭ UEA, ESF kaj s-ro Mijoŝi, kiuj kunfinancis la partoprenon de Esperanto en la forumo ĉi-jare. Sen tiu sponsorado ne eblus adekvate ĉeesti kaj havi entute la eblon informi pri Esperanto.

Peter Baláž
(el La Balta Ondo)

ESPERANTO-STANDO EN EKONOMIA FORUMO EN KRYNICA-ZDRÓJ

Ĉu „Esperanto” estas adreso de iu retpaĝo? Morta lingvo? Aŭ dialekto de la hispana? – demandis foje preterpasantoj ĉe la budo de esperantistoj. Kial ĝi ankoraŭ ne venkis? – demandis siavice konata pola eŭrodeputito Janusz Korwin-Mikke. La nura fakto, ke tiuj demandoj daŭre postulas respondojn, certigis nin pri la senco de nia ĉeesto en la forumo jam dekan fojon.



Efika disvastigado de Esperanto kun ĝiaj ideoj ne povos sukcesi, se en mensoj de homoj ne semiĝos unue apenaŭa konscio pri la simpla fakto, ke tiuspeca lingvo ekzistas. Foje homoj, kiuj jam scias, pri kio temas en la E-movado, bezonas recertigon. Ili pli ofte emas demandi, ĉu Esperanto ankoraŭ ekzistas, ĉar „iam ĝi estis moda, sed tiu tempo ja estas jam longe for”. Videblas do, ke la rekonado de la lingvo sufiĉe bone

funkcias ĉe la membroj de pli aĝaj generacioj, nun bezonatas ĉefe kultivado de la intereso – precipe ke la oferto por Esperanto-kursoj en Univeritatoj de Tria Aĝo pli kaj pli vaste. Sed la „naskadon” de novaj, junaj esperantistoj oni devas pene fari tute dekomence.

Ankaŭ alia tristiga afero klare videblis ĉe la forumo: lingva problemo en Eŭropa Unio daŭre ne estis solvita kaj eĉ ne tro ŝajnas, ke ĝi baldaŭ fariĝos tia. En la kazo de tiu ĉi forumo ne validas la fakto, ke oni plej facile komuniĝas kun alilandanoj en la angla lingvo. Pro granda kvanto de gastoj venantaj de la Orienta kaj Centra Eŭropo pli facile estis interkompreniĝi en

la rusa, kiu facile rekoneblas en ekssocialismaj landoj inkluzive 6 najbarlandojn de Pollando. Alian rimarkeblan impreson faris la malferma diksuto de la forumo inter geprezidantoj de Pollando, Makedonio kaj Kroatio, kiu devis esti tradukita al kelkaj lingvoj kaj aŭskultata per kapaŭskultiloj. Eĉ kiam la prezidantino de Kroatio parolis sian fluan, klaran kaj seneraran anglan, la duono de la publiko bezonis tamen similtanan tradukadon, kiu venadis unue kun kelksekunda malfruiĝo. Kaj kiuj grupoj bezonus havi facilan komunan lingvon pli urĝe ol politikistoj, entreprenistoj kaj aktivistoj, do homoj, kiuj havas la plej grandan influon al la bonstato de landoj? Kiu, se ne ili, havas pli grandan ŝancon uzi kaj lerni diversajn lingvojn? Por atentigi homojn pri tiuj lingvaj problemoj, la Esperanto-budo estis ekipita per diversaj allogaĵoj: skribiloj, glumarkoj, ŝildoj, sakoj, DVD-j, bultenoj, informiloj k. s. Tiu riĉeco de senpagaĵoj montriĝis sufiĉe okulfrapa por facile kapti atenton de la gastoj de la forumo, des pli ke nia stando staris tuj malantaŭ la enirejo. Per bona reklamado valoris montri al forumgastoj, ke esperantistoj ne estas iuj eksmodaj uloj batalantaj vane por sia idelisma venko, sed efikaj agantoj por disvastigado de lingva diverseco aŭ popularigado de malofte lernataj lingvoj kiel ekz. la slovaka.

Estus favore, ke iam la lingva politiko en la Eŭropa Unio ŝanĝiĝus for de la nuna maloptimuma formo per enkoduko de komuna lingvo, des pli post venontaj grandaj ondoj de novaj enmigrintoj de la Sudo, kiuj ankoraŭfoje alportos kun si plian porcion de lingva kaj kultura diverseco.

Mariusz Hebdzyński

EŬROPA TAGO DE LINGVOJ

Ĉi-jare la Eŭropa Tago de Lingvoj, la 26-a de septembro, estis prifestita de esperantistoj pli abunde ol en antaŭaj jaroj. Edukado.net atingis gravan sukceson tiel ke en la oficiala retejo de Konsilio de Eŭropo kiu organizas la festadon de tiu tago, akceptis enmeti sur la paĝaron ankaŭ afiŝon en Esperanto.



Kaj en la retejo efektive aperis 23 aranĝoj kiuj estis dediĉitaj al Esperanto, pli ol iam ĝis nun. Inter kvincento da anoncoj tio estas 4% de ĉiuj aranĝoj dediĉitaj al tiu tago. Mi kunlaboris en du tiaj aranĝoj. Aparte sukcesa estis tiu en Zagrebo. Esperantistoj anoncis sin por kunlabori kun reprezentejo de Eŭropa Komisiono en Zagrebo, kiu organizis Lingvan kafejon. Sur la Placo de Eŭropo en vitraj konstruaĵoj la 26-an de septembro eblis informiĝi kaj lerni 17 lingvojn inter kiuj estis Esperanto. Ĉe la kafotablo

instruistoj akceptis kelkajn interesitojn por informi kaj eduki. Tiu kafejo bone sukcesis. Estis kvin da junaj interesitoj pri Esperanto, krome pri Esperanto informiĝis pli detale aro da volontuloj kiuj helpis en la organizo. Pri ĉio skribis tagĵurnalo „Veĉernji list“ de Zagrebo. Pro

la okazaĵo al la Tago dediĉis Unua Programo de Kroatia Televido kadre de populara elsendo „Dobro jutro“ (Bonan matenon) 15 minutojn en kiu oni prezentis raportojn pri la ĉiam pli multa uzado de la angla en la ĉiutaga lingvo kaj intervjuon kun Maja Tišljar pri la lingvoj en EU (10-minuta). Ankaŭ grava radio-elsendo de Zagreba radio „Interparoloj kun Sonja« surbendigos tuthoran intervjuon kun d-ro Vidović, esperantisto, pri la lingvoj. Pri Esperanto tiel informiĝis kaj informiĝos centmiloj da homoj.

En Slovenio la E-societo de Maribor organizis publikan forumon la 28-an de septembro pri Riĉeco de Lingvoj en Eŭropo kadre de kiu prelegis Mario Vetrih kaj Zlatko Tišljar prezentis la portalon lingvo.info.

Zlatko Tišljar

ĈU ITALA AŬ EŬROPA KONGRESO EN SAN BENEDETTO SUL TRONTO DE LA 22-A ĜIS LA 29-A DE AŬGUSTO 2015 KAJ EN ROMO VENONTJARE?

Malgraŭ tio, ke en Norda Eŭropo oni rigardas al la italoj kiel al danĝeraj revoluciuloj, kiu daŭre ŝanĝas aferojn, ni vere estas konservemaj. Ni emas konservi ĉion. Unu ekzemplo: ni konservas la strukturon de la unua kongreso de Esperanto en 1905-a en Bulonjo-ĉe-maro. Niaj kongresoj daŭras unu semajnon, kiel, cetere, tiuj de UEA, kaj ili havas la saman strukturon kun eksursa tago en la merkredo.



Dum la lastaj 10 jaroj ni provis igi niajn kongresojn eŭropaj laŭ partoprenantaro, kaj nur duarange mondaj. Pri tio ni sukcesis ankaŭ ĉi-jare en Sanbenedeto-ĉe-Tronto, se vi volas scii kiel elparoli la nomon de la urbeto ĉe la rivero Tronto kaj ĉe la maro. Ĉeestis pli ol 200 partoprenantoj el pli ol 30 landoj. Por atingi tian ciferon estis ioma truko. Samtempe kaj samloke okazis la 81-a internacia kongreso de blindaj esperantistoj, kiuj sekvis sian sendependan programon kaj partoprenis la ĝeneralan programon.

La ĝenerala programo dum la lastaj dek jaroj estas kiel templo apoganta sin sur tri aŭ kvar kolonoj. La unua kolono estas Italujo mem, ĝia ĉielo (pro kiu sennombraj nederlandaj pentristoj venis al Italujo kaj restis ĉi tie), ĝia maro, ĝiaj montoj, ĝia historio. En difinitaj periodoj ni estis la Usono de la mondo kaj la antikvaj palacoj, katedraloj, cirkoj, pentraĵoj kaj tiel multe plu estas densa reto tra la tuta lando. Ankaŭ la ĉi-jaraj kongresanoj ne pasigis tagon sen ekskurso: Sanbenedeto mem, Askoli Piĉeno, Fermo, Maĉerata, Loreto, Rekanati, Ankona, Kastelfidardo) kaj Ĉivitela ĉe Tronto estas kelkaj el la nomoj de la ekskurso-celoj. Ne temis nur pri ekskursoj, ĉar en pluraj lokoj kunlabore kun la lokaj instancoj okazis eventetoj pri Esperanto por la loka loĝantaro.

La dua kolono estas kultura programo je internacia nivelo. Ĉiufoje ni havas du centrajn seminariojn kaj dekon da prelegoj. La seminariojn gvidas internacie konataj esperantistoj. Ĉi-

jare ni havis la prezidanton de UEA, Mark Fettes, kaj la junan reĝn de poetoj, Nicola Ruggiero, itala islandano, kiu, gajninte ĉiujn premiojn en la Belartaj Konkursoj, venis ricevi aplaŭdojn ĉe ni.

Mark Fettes parolis pri tutmondiĝo/tutmondigo kaj pri la sekvoj por ni, la tutmondigatoj. Ĉefe esperantistoj suferas pro la angla lingvo, kiu kuniras kun la ĉiam pli granda invado de kutluraj produktoj el Usono. Neniu havu la iluzion, ke tutmondiĝo signifas, ke ni ĉiuj fariĝas samnivelaj. Ni devos labori ankoraŭ pli por konvinki homojn, ke justaj solvoj ne bazitaj sur la pura forto estas la plej bonaj. Ŝajne en la mondo restis nur la papo de la katolika eklezio kaj la Esperanto-movado, kiuj pensas pri justeco kaj pri solvoj por plibonigi la mondon. Persona noto, de la verkinto de ĉi tiu artikolo, ne de Mark Fettes: ĉu Eŭropo helpas aŭ malhelpas en ĉi tiu proceso igi homojn dependaj de grandaj internaciaj firmaoj? Demandu vin mem kaj konsideru ĉu Eŭropo puŝas vin al la angla aŭ al Esperanto.

Nicola Ruggiero, [kies nomo estus en Esperanto Nikola Ruĝiero] okupiĝis pri pli simpla temo: “La originala literaturo en Esperanto”. La temo estas ja simpla. Ĉar ĉiuj konkurence aplaŭdas je la originala literaturo en Esperanto. Ekzistas tamen ankoraŭ kelkaj ne volontaj mortontoj, kiuj pensas, ke ĝi estas nenio kompare kun la tradukita literaturo. Ni lasu ilin batali inter si kaj kun Nikola. Al la kolono kulturo apartenas ankaŭ la prelegoj, el kiuj mi citas nur kelkajn prelegintojn: Romano Bolognesi, Maria Butan, Duncan Charters, Fabrizio Pennacchietti, Massimo Ripani, kiuj paroli pri la plej variaj temoj, de la instruado de Esperanto al la ekesto de la akuzativo en la mondo.

Aliflanke ni estas konservemaj ankaŭ pri tio, ke ni pensas, ke la ĉefa tasko de esperantistoj estas paroli pri Esperanto al la neesperantistoj. Tion oni faris en pluraj formoj: publika procesio malantaŭ la granda vorto ESPERANTO, prelegoj en la itala por la loka publiko, debatoj pri paco kun lokaj instancoj, tre sentemaj pri ĉi tiu temo, disdonado de informamaterialo, ktp.

Alia junulara kolono de nia kongreso estas la muzikaj spektakloj de internacie konataj esperantistaj artistoj. Almenaŭ unu ĉiutage prezentas ion kaj ofte ankaŭ por la loka publiko ekster la kongresejo. Ĉi-jare estis ankaŭ teatraĵo de Roman Dobrzynski pri doloraj momentoj dum la dua mondmilito travivitaj de Ursula Grattapaglia. Fine sed ne fone aldonu la ĉi-vesperan libroprezentadon kaj la noktajn programojn de la ĉeestantaj gejunuloj, kiuj komenciĝas akurate je la 23-a nokte. Nun vi eble komprenas, kial tiom da eŭropaj esperantistoj ĉeestas la italan kongreson.

Sed venontjare per spektakla abrupta ŝanĝiĝo ni proponos al vi ion alian: kongresi en Romo. El nia vidpunkto Romo estas iom tro granda periferia kvartalo de Frascati, la urbeto apud Romo fama pro sia vino. Ĝi estas tute apuda al Romo kaj tre bone kunligita per publika transporto al ĝi. Tiel vi povos dormi kaj ebriiĝi en Frascati kaj samtempe viziti Romon, viziti la Vatikanon, esti benataj de la Papo (se vi volas) kaj esti fotata en la Koloseo apud antikva roma soldato, kiu deĵoras ne por defendi la imperion sed por akiri turistojn. La datoj estas la samaj de la fino de aŭgusto, 20-27/8/2016. La kongresa temo estas pri edukado en Eŭropo. Komencu informiĝi ĉe kongreso@esperanto.it.

Renato Corsetti

LA DEKA RENKONTIĜO DE E-VERKISTOJ EN KROATIO

La 12-an de septembro okazis jam tradicia kaj unika renkontiĝo de Esperanto-verkistoj kiun organizas Kroata Esperanto-Ligo kaj E-societo Trixini en nordkroata vilaĝo Hraščina. La ĉeforganizanto estis Spomenka Ŝtimec.

Partoprenis kvindek da esperantistoj el Kroatio, Italio, Serbio, Pollando kaj Slovenio. La ĉefa gasto estis itala verkisto, sciencisto kaj vortaristo Carlo Minnaja, kiu prezentis sian novan libregon: Historio de Esperanto-Literaturo, sur pli ol 700 paĝoj. Lian biografion prezentis en intervjuo maniero Davor Klobučar kaj pri kroataj verkistoj en la libro parolis Zlatoje Martinov. Interesa deklaro de Minnaja estis ke se oni ree proponos E-verkiston por Nobela Premio lia opinio vira kandidato devus esti Trevor Steele kaj virina Spomenka Ŝtimec.

Nova esperantisto el la regiono Božidar Brezinščak Bagola parolis pri la periodo de la kroata nobelpremiito Ivo Andrić kiun li pasigis en Zagorje, regiono de la renkontiĝo. Zlatoje Martinov parolis pri la nova libro de Zlatko Tišljar: Nekutime pri multio. La kultura programo konsistis el du koncertoj de Georgo Handzlik (unu kun malnova repertuaro kaj alia kun la nova).



La ĉi-jara renkontiĝo okazis kiel kutime en amika atmosfero ekstere en la bieno de Spomenka dum tre bela suna vetero. La partoprenantoj estis ankaŭ regalataj per bonega tagmanĝo. La aranĝo estis interesa kaj altkvalita kaj pro la elstaraj gastoj kaj pro profesiaj recenzistoj.

Zlatko Tišljar

ĈU ESTRARANOJ RAJTAS ŜOVI AL EEU IDENTECAN IDEOLOGION?

La aŭgusta numero de *Eŭropa Bulteno* prezentis al la legantoj de la oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio diversajn informojn pritraktantajn la ĵus finiĝintan 100an Universalan Kongreson. Inter ilin ŝoviĝis artikolo kun la titolo "Du ideologioj", kiu aspektis kiel la ceteraj, sed kies enhavo fakte prezentas novan elmontron de la privata ideologio de la redaktoro de nia bulteno, Zlatko Tišljarić.



La artikolo prezentas du ideologiojn kiujn povus flegi esperantistoj rilate la lingvon mem. Unu laŭ kiu Esperanto povas taŭgi por unuigi la homojn de la mondo, portante mesaĝon pacan kaj internaciisman. Apud ĝi, Zlatko prezentas kaj defendas alian idearon, laŭ kiu nia lingvo, kiel ĉiuj aliaj, enhavus trajtojn identecajn, kiuj en adekvataj cirkonstancoj povus konduki al ties alprenado fare de la Eŭropa Unio kiel identeca lingvo de tiu superŝtato.

Per tiu ĉi teksto, mi deziras montri mian kompletan malkonsenton kun la artikolo, je tri niveloj: la enhavo, la stilo kaj la loko kaj maniero de publikigo.

Naciisma enhavo

Unue, pri la enhavo mem, mi plene malkonsentas kun la ideo aŭ la strebo ke Esperanto fariĝu lingvo speciala, surbaze de kreo de identeco por iu teritorio, estu ĝi regiono, ŝtato aŭ altnivela grupo.

Zlatko asertas ke lingvo havas du ĉefajn rolojn: komunikan kaj identecan, kaj ke tiun ĉi lastan ni devas ekspluati por Esperanto. Nu, fakte lingvo havas plurajn celojn, ne nur tiujn du, kaj ne ĉiuj estas pozitivaj. Ni certe scias ke lingvo povas helpi en la kreado de identecaj trajtoj, kaj ke granda parto de la moderna strebo krei naciismojn kaj eĉ naciojn en Eŭropo kaj aliloke fontas el la agnosko de aparta lingvo. Sed tio ne igas tiujn strebojn dezirindaj aŭ pozitivaj. Eĉ pli, ĝenerale esperantistoj emis vidi tiujn uzojn de la lingvoj por apartigi homojn kiel ion negativan, danĝeran kaj foje mortigan. Ni kreis ĉi tiun ilon ĝuste por transcendi tiujn ĉi barierojn, por trovi manierojn interkomunikiĝi sendepende de la naciaj lingvoj, por ke homoj kaj komunumoj povu iom post iom forgesi pri la naciaj limoj bazitaj sur etnoj kaj similaj grupoj, kaj certe ne por fortigi iujn limojn, eĉ ne tiujn de la fortreso Eŭropo.

Komparu la frazon de la artikolo de Zlatko Tišljarić: «Esperantistoj volas kredi ke ili estas apartenantoj al iu tuthomara socio, al kiu devus logike aparteni ĉiuj – ĉar ni ja ĉiuj estas homoj. Tamen tio estas grandega memtrompo. Neniu povas ami same forte ĉiujn homojn de la mondo. Oni amas nur tiujn membrojn de tiuj el la grupoj al kiuj oni apartenas, kiuj estas endanĝerigitaj.»

Ĉu tion ni volas? Kio okazis al la streboj de la esperantistoj, ke *ne kunvenu francoj kun angloj, nek rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj*? Ĉu nun ni devas peti oniajn pasportojn, ĉu ni pensu ĉu temas pri eŭropanoj antaŭ ol decidi ĉu oni amu alian homon? Ĉu por tio taŭgu Esperanto? Certe mi ne sentas min identigita kun tiu ideologio, kaj espereble ankaŭ ne plejmultaj eŭropaj esperantistoj.

Mi certe esperas ke Eŭropo adoptu Esperanton, sed kiel civilan kaj interhoman lingvon, ne kiel identecan simbolon nek interpolitikistan lingvon. Identeca lingvo nur forpuŝos ekstereŭropanojn, nur interhoma lingvo povas ilin altiri, kiel ekzemplo por krei alian fortorilaton en la mondo.

Demagogia formo

Mia dua plendo rilatas al la formo. Por prezenti sian tezon, unue Zlatko komencis per priskribo de la alia ideologio. Tiu ŝajne estus la *tradicia* ideologio, tiu de la "*klasika*" esperantismo, tiu kiun li vidas ĉe UEA kaj konstatis ĉe la homoj kongresantaj en Lillo. Por pli bone defendi siajn tezojn, li uzas tiun retorikan trukon kiun oni nomas "pajlohom": oni atribuas al la opona tezo troigitajn trajtojn, je kiuj neniu nun vere kredas, por ilin ridindigi. Oni nomas ĝin "totalisma" aŭ eĉ "dogma", kaj, en kompleta demagogia maniero, oni egaligas ĝin al la anglalingveca ideologio de EU, dum sian tezon li prezentas kiel nova kaj moderna. Kaj, por doni finan baton, oni karakterizas la oponan tezon kiel "religiecan dogmismon kaj mistikismon".

Tiu retorika truko estas sufiĉe konata, por esti prenata serioze. Kiu sentas sin identigata kun la karikaturo montrata de Zlatko? Neniu, simple ĉar tiu mistikisma ideologio ne ekzistas, laŭ la portreto kiun la aŭtoro pentras. Fakte, se io devas esti nomata "religieca dogmismo kaj mistikismo", tio estas la politiko de identeco kiun la naciistoj, inklude de la eŭropaj naciistoj, ĉiutage montras.

La tradicia ideologio de la esperantismo, tia kia ĝin aprobis la kongresantoj de Bulonjo, kaj al kiu probable sin plu sentas ligataj la plej multo de la kongresantoj de Lillo estas klara: «La Esperantismo estas penado disvastiĝi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu "ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn", donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj.»

La karakterizado de Zlatko estas karikaturo de tiu ĉi. Ĝi celas pentri la strebon al internaciisma movado kiel ion emocian, dum la kreo de identeco estus io racia. Sensencaĵo! Se ion oni povas nomi emocia, tio estas la fortikigado de naciismoj kaj la flegado de grupalismaj tendencoj. Krom se vi konsideras racia la lekadon de la botoj de la eŭropaj politikistoj, por ke ili sendu panerojn al ni.

Mislokita prezentomaniero

Fine, kaj pli grave, mi kontestas la lokon kaj manieron publikigi la artikolon de Zlatko Tiŝljar. Li kompreneble havas ĉian rajton publikigi siajn ideojn ie ajn, kaj fakte li jam sin esprimis amplekse en libroj kiel "Eŭropa identeco" kaj en multnombraj artikoloj. Sed en tiu ĉi kazo, la artikolo aperas en tre elstara loko de la bulteno kiun li redaktas nome de Eŭropa Esperanto-Unio, kiel dua artikolo, eĉ antaŭ la raporto pri la ĝenerala kunveno de la asocio mem. Ĝi aperas kun la sama tiparo kiel la ceteraj artikoloj, sen aparta atentigo ke temas pri opiniartikolo, kun la sama subskriba formo kiel ĉiuj ceteraj raporto de la bulteno.

Mi ne oponas ke en la bulteno aperu foje opiniartikoloj de la redaktoro aŭ de iu ajn membro de la landaj asocioj, sed en tiu ĉi kazo, sufiĉas ĵeti rigardon al la tuta bulteno por noti ke ne restas klara la distingo, ke temas pri persona opinio. En la artikolo oni uzas ofte redaktadon kiu montras ke oni konsideras ĝin kiel ideologion de grupo de personoj kiuj gvidas la asocion.

Eĉ pli, kiam mi levis la demandon en la reta forumo de la Asembleo de EEU, la aŭtoro defendis la artikolon kiel montron de ideologio de la Asocio. Ankaŭ la prezidanto montris sian konsenton kun tiuj ideoj, kiel gvidiloj por la agado de EEU. Tio estas absolute neakceptebla, ĉar la asocio, kiel tegmenta federacio de landaj asocioj, havas la devon resti politike neŭtrala.

Zlatko asertas laŭvorte: «antaŭ dudeko da jaroj iuj el ni klopodante trovi rolon por Esperanto en Eŭropa Unio, ideala ŝtato kun bezonego trovi komunan lingvon, ekserĉis pli racian kaj por politikistoj pli akcepteblan idearon ol estas la interna ideo de esperantistoj. Evoluis iom post iom alia ideologio pri Esperanto konvena por Eŭropaj celoj.» Nu, se tiuj "iuj" deziras antaŭeniri tiun "por politikistoj pli akcepteblan idearon", ili rajtas krei politikan partion aŭ movadon. Sed ili ne rajtas misuzi la rimedojn de la landaj asocioj, kaj eĉ insulti la tradicion de tiu movado.

Bedaŭrinde, ne temas pri la unua fojo. Tiu agado por antaŭenigi propran ideologion oni vidas delonge. Legantoj memoru la damaĝan leteron kiun EEU sendis en 2010 al la Eŭropa Komisiono, kadre de publika konsultado pri la strategio de EU por la nova jardeko, plenan je politikemaj opinioj, kaj pri kiu UEA mem devis atentigi ke ĝi ne plenumas la necesajn kondiĉojn pri neŭtraleco kiun oni atendas de la landaj asocioj. Kaj similaj epizodoj ripetigis plurfoje, sen ke la estraro de EEU estu kapabla kompreni ke ili ne rajtas miksi sian ideologion kun la agado de la organizaĵo.

Neniu esperantisto devas esti neŭtrala, kaj eĉ la landaj asocioj foje devas preni pozicion en sociaj temoj, precipe kiam ili rilatas al la lingvaj kaj ĝenerale al la homoj rajtoj. Sed plejmultaj tiuj landaj asocioj ne rajtas sin esprimi pri politikaj temoj, nek por antaŭenigi la ideologian starpunkton de siaj gvidantoj, nek por plaĉi al la regantaj politikistoj. Kaj do ili ne rajtas fermi la okulojn kiam ilia reprezentanto en Eŭropo tiel agas.

José Antonio del Barrio

PRI ESPERANTO-JUNULARO



Dum la 100-a UK en Lillo mi konatiĝis kun la (tiam) TEJO-respondeculino pri kontaktoj kun EEU, Veronika Poór. Interalie ŝi faris interesan prezenton pri Trello (www.trello.com), reta sistemo kiu laŭ ŝi povas esti potenca ilo por kunordigi taskodisdividon por projektoj (kiel ekz. seminarioj aŭ aliaj eventoj) ene de internaciaj organizoj. TEJO jam sukcese uzadas ĝin ĝuste por tio, kaj ĝi povus eble taŭgi ankaŭ por aliaj asocioj. La retejo nun daŭre ebligas senpagan aliĝon kaj uzon, momente nur la plej ambiciaj eroj (kadre de "business"-modelo) estas pagaj. La "trello.com"-retejo mem enhavas mallongan klarigon en la angla pri kiel ĝi funkcias, kvankam evidente sen la konkretaj ekzercoj kiujn ebligis Veronika dum sia prezentado. Homoj kiuj interesiĝas pri la koncerna prezento-dosiero de

TEJO kiel .pdf, bv. sin turnu al mi.

Iom poste Veronika elektiĝis kiel baldaŭ nova ĝenerala sekretario en CO, pri kio ni elkore gratulas. Dum la sekva IJK de TEJO elektiĝis nova estraro, kaj ŝian funkcion kiel respondeculo pri kontaktoj kun EEU transprenis Michael Boris Mandirola, la novelektita prezidanto de TEJO (ankaŭ al li elkoran gratulon!).

Sandra Schweder

ASIMILADO, INTEGRIĜADO KAJ EGALRAJTECO

Nuntempe rilate novalvenintojn al Eŭropo, kiuj ne estas eŭropanoj, oni parolas nur pri du eblaj politikoj: aŭ insisti pri ilia asimiliĝo aŭ integri ilin al al socio nova.

La asmiliĝo estas absolute malakceptebla en la nuna tempo, kvankam ĝi dominis dum la tuta antaŭa historio kaj ankaŭ nuntempe en multaj landoj kun »pura kulturo«, en kiuj ĝis nun ne ankoraŭ miksiĝis sentebla kvanto da malsamkulturoj oni tiel vidas la aferon. Asimiliĝo signifas ke novalvenanto devus komplete rezigni pri sia antaŭa aparteno kaj nur transpreni la novan. Do siriano en Germanio devus tuj lernegi la germanan lingvon kaj kulturon, ekami germanan popolon kaj ekopinii ke nun li mem estas nur germano. Tio nek estas ebla, nek estas saĝa ĉar ĝi perfortas la homon kaj forprenas bazan homan rajton aparteni al kulturo al kiu li volas.

La moderna Eŭropo fakte esence parolas pri integrado. Tio signifas ke la novalvenanto devas akcepti novan patrujon kiel sian kaj novan kulturon kiel sian, sed ne rezigni pri sia antaŭa. Sekve la nova aldoniĝas al la malnova kaj la siriano en Germanio post iom da jaroj, kiam li scios bone la germanan kaj konos la germanan vivmanieron, devos akcepti ĝin kaj kondukti harmonie kun ĝiaj leĝoj ne rezignante pri sia aparteno al siria popolo kaj kulturo (do li plu aktive kunvivos kun aliaj sirianoj, kontaktos siajn amikojn kaj parencojn en Sirio, subtenos diversmaniere sirian kulturon kaj zorgos pri konservo de sia siria lingvo).

Sed malgraŭ ĉio, ambaŭ alirmetodoj estas diskriminaciaj kaj ne ebligas al novalvenanto senti sin egalrajta kaj do akcepti kun sincera amo sian novan medion, ĉar koni samkvalite novan lingvon kun la hejmanoj ne eblas kaj li ĉiam sentos sin duaranga.

Ĉu egalrajteco por novalvenanto eblas? Eblas en multnaciaj landoj kia EU, kondiĉe ke tiu solvis la problemon de egalrajteco ankaŭ inter siaj konsistaj popoloj. Se EU havus edukon por eŭropa konscio kaj valoroj en ĉiuj lernejoj kaj do kreus el ĉiu eŭropano ne nur membron de sia nacio sed ankaŭ sinceran eŭropanon, kaj tion solvus per neŭtrala lingvo kiel komuna identeca lingvo eŭropa apud la naciaj lingvoj, la samo aplikeblus ankaŭ al novalvenintoj. Ili simple devus esti unue edukataj por eŭropa konscio kaj valoroj kaj lerni eŭropan neŭtralan lingvon samkiel ĉiuj aliaj eŭropanoj. Poste, kiam ili decidus vivi en konkreta lando ili lernos ankaŭ la lingvon de tiu lando, sed la kvalito de la scio ne gravus por lia civitana pozicio, ĉar ĉiuj parolos ankaŭ la komunan lernitan neŭtralan. Do, li ne sentos sin diskriminaciata ĉar li uzos komunan lingvon en sama grado kiel aliaj. Kaj tiel li povos sincere akcepti eŭropecon kiel novan sian identecon. Ĉu li akceptos ankaŭ la nacian lingvon de lando en kiu li vivas aŭ ne – ne gravus, ĉar li ĉiukaze povos foriri al kiu ajn alia lando kaj ankaŭ tie esti eŭropano, ĉar ĉie li povos komuniki eŭroplingve.

Kompreneble, ke infanoj de tiuj personoj frekventos naciajn lernejojn kaj lernos la lokan nacian lingvon kaj ankaŭ integriĝos kun lokuloj, sed oni ilin ne devigos same kiel ne la plenkreskulojn.

Zlatko Tišljarić

RUMANA ESPERANTO-KONGRESO

La tutlanda okazis en Timișoara (la tria plej granda urbo de Rumanio) de la 4a ĝis la 6a de septembro. Okazis simpozioj tra la lastaj tri jaroj (vidu EKO 2014-45 de septembro 28). La nuna kongreso altiris ĉ. 40 partoprenantojn, plejparte el la okcidento de la lando. Mankis el Bukuresto kaj orientaj urboj. Kongresejoj estis Liceo (kuna loĝado) kaj la Okcidenta Universitato. Ambaŭ lokoj disponigis faciligojn kaj la kostoj estis subvenciataj. Okazis Arta Vespero en apuda kulturcentro kaj simpozio dulingva en la universitato, kiu tamen ne altiris malmultajn neesperantistojn.

2015 estas elektojaro en EAR (Esperanto-Asocio de Rumanio). La elektoj okazis laŭ nova statuto, akceptita en la kongreso. Estis elektita kvinpersona estraro kun tri timișoaranoj. La prezidantino estas Aurora Bute, komitatano de UEA kaj aktivulo en ILEI. La nova kasisto junas kaj regas bone la lingvon, kaj financojn. Tri estraranoj havas bonajn universitatajn kontaktojn, kaj tia agado fariĝos ĉefa kampo por EAR. La estraro konsistas el kvin personoj: prezidantino: Aurora Bute, vicprezidantoj: Șova Robert, Crâncău Emil, Pitar Mariana, estrarano pri financoj: Birta Petronela, sekretario: Popa Florica.

Laŭ la nova statuto, estas nomumita dek-persona skipo (do 15 entute) kiu formas Nacian Konsilion (la ekvivalenton de la Komitato en UEA), kun bona distribuo tra la lando. Nova statuto estis ellaborita kunlabore kun advokato, kaj modifas la strukturon de la Asocio (EAR). Elektoj plue okazos ĉiun trian jaron. La kunvenintoj rumanlingve akceptis la dokumenton; ĝi nun estos jure deponita. La sidejo de EAR restas en Timișoara.

La kongreso raportis pri reunigo de la rumana movado. Okazas kursoj en Timișoara, kaj almenaŭ du junulaj kongresanoj parolas flue kaj aktivas, pliaj ekzistas, sed devas ankoraŭ ekzerci la lingvouzon. Pli esperiga situacio ol trovita tra la lastaj jaroj.

Partoprenis la vicprezidanto de UEA, Stefan MacGill, kiu konsentis plenigi dufoje jare paĝon en la asocia revuo ES-TO por konigi aktualaĵojn pri UEA. Li (malsurprize) varbis pri AMO 17 jarfine en Eger, Hungario, kun temo 'Junigi la komunumon', por kiu UEA aljuĝos stipendiojn al junuloj aŭ junulgivdantoj tra la sudorienta parto de Eŭropo. En 2016 – eble septembre – EAR volas okazigi internacian aranĝon, ĝuste pri la universitata kunlaboro. UEA promesis diskonigan helpon. Donacitaj libroj kaj revuoj estis venditaj kaj la enspezita mono uzata por membrigoj, ekzemple al UEA kaj ILEI.

Konklude: Ĝenerale pozitiva impresio. La financa bazo stabiliĝas, eĉ se kun tre limigitaj rimedoj. La emfazo je universitata agado (ja ne nova fenomeno) ŝajnas pozitiva kaj fleginda, precipe per kontaktoj kun najbaraj kaj aliaj landoj.

Stefan MacGill kaj Aurora Bute

27-A EŬROPA RENDEVUO EN NORDA FRANCIO

La Eŭropa Rendevuo de Stella okazas dum novembra semajnfino de sabato la 14-a ĝis dimanĉo la 15-a de novembro. Estos diversgradaj Esperanto-staĝoj kaj distraĵoj en amika etoso. Inter aliaj Katalin Kovats, redaktoro de edukado.net, gvidos lingvan kursion. La Eŭropa Rendevuo de Stella estas la plej grava Esperanto-aranĝo en norda Francio!



**La Nordfrancia
Esperanto-Federacio
invitas vin al la**

27a Eŭropa Rendevuo

en STELLA-PLAGE
apud Le Touquet-Paris-Plage ĉe la Manika marbordo
en la bela kaj komforta feriejo Stella-Maris

14a-15a de Novembro 2015



Danco kun Roch Jullien

Muziko kun Floréal Martorell

Vizito de la fama urbo
Le Touquet

Furora ludo RISKO

4 lernigaj kaj kulturaj atelieroj

Arta ekspozicio

Vi lernos, kleriĝos, amuziĝos kaj amikiĝos!

LA 14-a NOVJARA RENKONTIĜO (NR) KAJ 7-a NIS

La 14-a Novjara Renkontiĝo (NR) okazos en Saarbrücken, tuj apud Francio de 27-a de decembro 2015 ĝis 3-a de januaro 2016. Taŭga regiono por internacia kunveno, ĉu ne? Ekzemple trajnoj el Parizo bezonas eĉ ne du horojn...

Por familioj kaj "nefamilioj"

Multaj el vi jam aliĝis kaj antaŭĝojas denove kunveni en internacia rondo. Aliĝis ankaŭ jam trideko da infanoj kaj junuloj, fine kutime estas sesdeko - jes, NR kaj NIS estas tre taŭgaj por familioj, estas multaj programofertoj por infanoj, tiel ke la gepatroj povas iom senzorge ĝui la kunestadon kun samaĝuloj. Sed certe NR ne estas nur por familioj. Bonvenas ĉiu sendepende de la aĝo kaj fakte kutime trideko da partoprenantoj estas "nefamilioj" - unuopuloj kaj paroj sen (ĉeestantaj) infanoj.



7a Novjara Internacia Semajno (NIS) por junuloj
 Dum la pasintaj jaroj Novjara Internacia Semajno (NIS) establiĝis kiel kunveno por junuloj ĉe la okcidenta rando de Germanio, ĝis nun ĉefe inter proks. 12 kaj 20 jaroj. Pro la longa distanco al la ĉi-jara JES kelkaj pli aĝaj junuloj jam anoncis sian partoprenemon... Formiĝis en NIS internacia grupo de dudeko da junuloj, kiuj vivas sian propran ritmon

laŭ siaj deziroj. NIS estas ideala kunveno, kiam gepatroj kaj junulaj infanoj volas komune ferii, sed tamen havi sian apartan programon. Sed kompreneble kelkaj pli aĝaj junuloj afable permesas al siaj gepatroj ferii aliloke...

Skolta ekskurso

Ĉi-jarfine la Verdaj Skoltoj planas dutagan ekskurson dum la semajno. Estos orientiĝa marŝado kun serĉado, memkuirado, tranoktado en iu dometo... Certe Valère Doumont sperte kaj bele aranĝos tion.

Koncertoj dum NR

Ĉi-jare planas viziti nin kaj koncerti por ni *Ĵomart kaj Nataŝa*, kiuj jam pli frue ĝuigis nin dum pluraj NR-oj. Pliaj muzikaj ofertoj estas preparataj.

Prelegoj, laborgrupoj, promenoj...

Kiel kutime estos proks. okdeko da diversaj ofertoj dum la semajno - prelegoj pri plej diversaj temoj, laboraj kaj diskutaj rondoj, promenoj por iom senstreĉiĝi ekster la domo... Kaj kompreneble estos kafejo por libere babili kun malnovaj amikoj kaj novaj konatoj. Lingvo-kursoj... okazos, kiel ĉiam, en diversaj niveloj, por komencantoj, progresantoj, konversacia rondo.

Veraj lingvokursoj por infanoj kaj junuloj supozeble ankaŭ ĉi-jare ne estos - la sperto montras, ke la geknaboj dum la ferioj preferas ferii al ĉio lernejsimila... Ili lingve spertiĝas dum la diversaj programoj.

Aliĝoj kaj pliaj informoj: En Facebook-paĝo:

<https://www.facebook.com/events/701061096672344>

aŭ sur <http://www.esperantoland.org/nr/index.shtml#nr>

Pri la aliĝintoj jen la listo: http://www.esperantoland.org/nr/partoprenantoj_nr14.php

Kaj por tuj aliĝi <http://www.esperantoland.org/nr/alighilo.shtml#alighilo>

Lu Wunsch-Rolshoven

ALTERNATIBA ATINGIS PARIZON – EN ESPEARNTO

ALTERNATIBA – alternativa mondovilaĝo en Parizo en decembro lanĉas alvokon al tradukado de iliaj ĉefaj dokumentoj, kaj ni jam faris tion pri Esperanto.

Vidu - ilia retejo ankaŭ „parolas“ Esperanton:

<https://alternatiba.eu/eo/alvoko-por-prialternativa-mondo-vilago-en-parizo-dum-la-cop21-la-5an-kaj-6an-de-decembro-2015/>

Jam ekzistas iom da informoj ankaŭ en la angla (kun du filmetoj je 3mn), en la hispana <https://alternatiba.eu/es/prensa/videos-3/>, en la germana (<https://alternatiba.eu/de/>).

Alfred Westermayer

LA 52-AJ BALTIAJ ESPERANTO-TAGOJ (BET – 52) INVITAS

Litova Esperanto-Asocio afable invitas vin partopreni tradiciajn la 52-ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn (BET-52). La aranĝo okazas sub aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio de la 2a ĝis la 10a de julio 2016. BET okazas ekde 1959 ĉiujare laŭvice en Latvio, Estonio, Litovio. BET-52 okazos en la urbo Birŝtonas, kiu situas 40 kilometrojn for de Kaunas kaj 90 kilometrojn for de la ĉefurbo de Litovio Vilnius, apud la ĉefa rivero de Litovio Nemunas. Ĝi situas en la centro de la regiona nacia naturparko, ĉirkaŭita de belegaj pinarbaroj. Birŝtonas estas antikva kaj fama balneologia kuraĉloko de Litovio, fondita en 1382. La urbo estas ideala loko por laboro kaj ripozo, ĝi estas facile atingebla buse kaj automobile. Eblos uzi multegajn (pli ol 50) diversajn kuracajn kaj sanigajn procedurojn kaj servojn, naĝejon, saŭnon, sportan salonon k.a. BET-52 havas subtenon, kunlaboron kaj diversflankan helpon de la urba municipo. La ĉefa lokalo de BET-52 estas bonege ekipita sanatorio Versmė. En Birŝtonas jam okazis BET-40 en 2004.



Ni invitas ĉiujn esperantistojn. Speciale ni dezirus vidi esperantistojn el la landoj ĉirkaŭ la Balta Maro, sed ankaŭ de ĉiuj aliaj najbaraj kaj pli foraj landoj. Antaŭ kaj post BET-52 estas ebleco laŭ moderaj prezoj aktive ripozi, plibonigi sian sanon, uzi multegajn sanigajn kaj kuracajn procedurojn kaj servojn, kuraci sin en unu el tri tre altnivelaj kaj modernaj sanatorioj kaj kuracejoj de Birŝtonas Versmė, Tulpės kaj

Eglė aŭ en urbaj hoteloj, gastejoj, turismejoj kaj ripozejoj.

Eblas aliĝi rete www.esperanto.lt/aligxilo_BET.html. Pri aliaj aliĝeblecoj legu en retejo de la aranĝo. Prezoj de loĝado, manĝado, pageblecoj kaj aliaj financaj kaj aliaj kondiĉoj estas

troveblaj en retejo de la aranĝo. Esperantistoj, kiuj grave kontribuos al la programo de la aranĝo por la loĝado (krom hoteloj) aŭ manĝado laŭelekto ne pagos.

Programo: tradicia, t.e. somera universitato, paroligaj kaj perfektigaj kursoj, literaturaj aranĝoj, muzikaj kaj artaj vesperoj, debatoj pri situacio kaj problemoj de Esperanto-movado en baltiaj landoj, tradukista kurso, pedagogia seminario, seminario de klubestroj kaj aktivuloj, movada lernejo, scienc teknikaj kaj fakaj aranĝoj, instruado de kantoj, junularaj aranĝoj, konkursoj, kvizoj, distraj programeroj, ekskursoj, ripozado en naturo, diskutoj, forumoj, libroservo, diservo, interkona vespero, baza konatiĝo kun litova lingvo kaj kulturo, ekspozicioj, filmoj kaj lumbildoj, gazetara konferenco, sportaj ludoj, oficiala malfermo kaj fermo, adiaŭa vespero.

Aktualajn informojn pri BET-52 Vi povas trovi en retejo de BET-52 www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET52 . Tie vi trovos plenan kaj detalan Informilon pri BET-52. Krome, informoj pri BET-52 estas konstante publikigataj en novaĵretejo La Balta Ondo (www.sezonoj.ru), novaĵretejo Barelo (www.barelo.blogspot.com) kaj en la revuo La Ondo de Esperanto.

Kontaktadreso: p.k. 167, LT-44287 Kaunas, Litovio, Litova Esperanto-Asocio. Poŝtelefonoj de LEA estas +370-687-12219 ; +370-686-69875. Telefakso estas: +370-37-228616. Retadreso de LEA estas: litova.ea@mail.lt; irenaa@takas.lt; pjedorovas@takas.lt . Retejo de BET-52 estas www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET52 .

Povilas Jegorovas

STAĜOJ EN KULTURCENTRO KVINPETALO EN BOURESSE

Du paralelaj staĝoj okazos en la kulturcentro Kvinpetalo en Bouresse, Francio, de la 19a ĝis la 23a de oktobro.

Praktikado de la lingvo plurnivela, kun Ansofi Markov

La kurso koncernas komencantojn, komencintojn, progresantojn... Studado en etaj grupoj, adaptita pedagogio, familieca etoso. Por havi ideon pri tio, kio atendas vin, vidu ankaŭ raporton pri [antaŭa samspeca staĝo](#). Familioj kun infanoj estas aparte bonvenaj! Eblas trapasi la ekzamenojn de FEI je la fino de la staĝo.

Praktika staĝo pri ekologia ĝardenumado kun Bernard Lagrange

Aŭtune la unua paŝo por pripensi ekologian mastrumadon de ĝardeno estas konservi vivanta la grundon. De jam pluraj jaroj en Kvinpetalo oni amasigas la organikajn defalaĵojn (legomrestaĵojn, branĉetojn, eltonditan razenon...) kaj nun necesus fabriki simplan kribrilon por disigi la utilan kompoŝton disde la tro dikaj lignopecoj. Oni ankaŭ lernos la uzadon de la specialaj iloj por prepari respektive la grundon sen plugado.

Pri teknikaj detaloj, vidu la retejon de Kvinpetalo <http://www.kvinpetalo.org/>

Retadreso: informoj @ kvinpetalo.org (forigu la spacojn)

Claude Nourmont

KURSOJ EN GRESILLON

De 16a ĝis 20a de oktobro 2015 : Korusa renkonto, retejo www.gresillon.org/koruso 24a de oktobro ĝis 1a de novembro 2015 : kursaro AŬTUNE, retejo www.gresillon.org/autune-AMO-seminario 'Grimpi la monton granitan' kun Stefan MacGill

- lingva seminario kun Christian Rivière
- rekta metodo kun Zsófia Pataki
- speciala programo por infanoj, inkl. Halovena vespero
- aliaj interesaj aktvaĵoj

MCE Grésillon, St. Martin d'Arcé, 49150 BAUGÉ-EN-ANJOU, France,
+33 - 241 89 10 34, kastelo@gresillon.org

Bert Schuman

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 30-an de septembro 2015

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Peter Baláž, Mariusz Hebdzyński, Renato Corsetti, Zlatko Tišljár, José Antonio del Barrio, Sandra Schweder, Stefan MacGill, Aurora Bute, Lu Wunsch-Rolšoven, Alfred Westermayer, Claude Nourmont, Bert Schuman

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno>

